



# Ni trovis vin, Vombato!

Originalo de  
Angela  
McAllister  
kaj  
Charles Fuge

Tradukita de  
Nikoniko





Eta Vombato ludis  
kaŝludon kun  
Kuniklo kaj Koalo





“Mi trovis vin!” diris Koalo




“Nun ni kašos nin, kaj vi serĉos nin,” diris Kuniklo.






Kuniklo kaj Koalo kaŝis sin.



Same faris Eta Vombato.



Kuniklo kaj Koalo  
atendis kaj atendis ...  
kaj provis resti tre  
silentaj.

Same faris Eta Vombato!





“Lasu nin rekomenci!” ridis Koalo.


“Vi kalkulu ĝis dek kaj tiam venu serĉi nin.”

Eta Vombato fermis siajn okulojn.

“Du, DEK” li diris.



“Ne, ne! Kalkulu dek florojn kaj tiam venu trovi nin,”  
vokis Kuniklo kaj Koalo dum ili forkuris por kaŝi sin.





“UNU ...” komencis Eta Vombato. Tiam li serĉis pli da floroj.





“Du, tri, kvar ...”

Super la monteton li kuris,  
kalkulante ĉiujn florojn.





Li ne rimarkis  
la nubon kiu  
ekkaŝis la  
sunon.

Li ne rimarkis  
la ĉielon kiu  
griziĝis.

Li ne rimarkis  
la venton kiu  
skuis la  
arbojn.





“... DEK! Mi venas!” vokis Eta Vombato.





Sed kie estis Koalo?  
Kie estis Kuniklo?  
Subite Eta Vombato  
sentis sin tre sola.  
“Kie mi estas?” li diris.





Gut' ... gut'...

Pluvgutoj komencis fali  
de eta, malhela nuboj.

Gut' ... gut'....

Plorgutoj komencis fali  
de eta, perdita vombato.





Sed la suno ne restis longe kaŝita.  
Kaj ankaŭ Eta Vombato estis baldaŭ  
trovita.

“Ho, tio estas tre malstabila fungo...”





... mi trovis vin!” diris Panjo. “Kia bonega pluvombrelo!”







“Lasu nin salti en la flakojn,” diris Kuniklo.

Kaj Eta Vombato plej grande kaj plej feliĉe salte ŝprucis akvon la tutan vojon hejmen.